

OFICIALA ORGANO DE PROLET-ESPERANTISTA UNIO DE IBER-AMERIKAJ LANDOJ

II-a Epoko 2-a (5) JARO	REDAKTEJO - ADMINISTREJO Hospital, 54, pral. - Barcelono	BULTENO FEBRUARO 1936	SOCIA SIDEJO Cros, 4 - Barcelono (Sans)	Nr-o 4 (33)

La laborista esperantismo en Hispanio

(Dediĉata al la II-a Kongreso de P.U.I.L.)

Kaj kion ni diros pri la *nacia* panoramo ankaŭ? La nacia situo de esperantismo laboristtendenca estas en domaĝa stato. Plej diversaj kaŭzoj efikas por ke ne kristaliĝu klasa movado de laborista esperantismo. Parto el la kulpo obeas al la internacia malumo; sed la pli grava parto de kulpo kuŝas inter la esperantistoj hejmaj, kiuj estas viktimoj ĉefe pro mallumaj kaj subteraj politikaj movoj de ĉionreganta reakciularo, al kiu nekonscie ofte ni servas, kio kreas inter-regionaj antagonismoj (kiel okazas en la inter-naciaj malamoj), kiuj, de esperantistoj pli ol de iu ajn persono, devus esti supervenkataj per nia cerbo kaj akcele atingi tian intereskomunan zonon, kiun nia proleteca esperantismo bezonas.

Ĉia reciproka malfido inter diversregionaj loĝantoj transformiĝas en nekonscia apogo al niaj ekspluatantoj, kio estas kion ĉi tiuj celas, kaj tiel *neŭtraligi* kaj *dividi* la kunigeblajn fortojn de laborista klaso, per kies unueca agado oni povas detrui la reziston kaj unuigitan forton de burĝaro. Kaj laborista esperantismo pagas ankaŭ siavice konsiderindan tributon — pli ol proporcie al sia pagokapablo — al tia malkompreno; malkompreno tiel ne meritita kiel lojala al la interesoj de proletaro.

—1—

En Hispanio ni havas frapantan mozaikon. La laborista esperantismo estas disigita en tioma kvanto da pecetoj, kiom da grupoj ekzistas, preskaŭ. Ĉu tio ne ruĝigas nin pro honto? Kia estas la celo de tioma nombro da izolitaj laboristaj grupoj kaj izoluloj?

Ni ne klaĉas, per ĉi diroj. Jen estas la pruvo. La diversaj laboristaj societoj de Esp.o povas esti grupigataj en jena klasifico:

1. *Neŭtralemaj.* — (Grupoj k. individuoj, kiuj malgraŭ ne aparteni al UEA, ili havas romantikan opinion pri Esp. kaj ekster la esperantaj grupoj ili pensas kaj agas pli aŭ malpli laboristece).

2. S. A. T. — grupoj 3. L. E. S. 4. I. P. E.—grupoj, 5. I. S. E.—grupoj, 6. P. U. I. L.—grupoj. Ni ne volas signifi, ke la grupoj apartenas al tiuj organizaĵoj, sed ke ili estas *sub influo* de ĉi ties membroj.

Ĉiu el la ses esperantistaj sektoroj ne rilatas inter si; nek ekzistas, krom PUIL—aj grupoj, organikaj rilatoj inter la konsistantoj de ĉiu aparta sektoro, *naciskale.*

—2—

Antaŭ la Kongreso de PUIL, prezentiĝas grava problemo por solvi. Kiel kunigi la tutan proletan movadon de Esp.o en la lando? Kion ni devas fari? Kiun kriterion havas ĉiu sektoro aparta pri la unueco aŭ pri la alianco esperantista? Ĉu povas fari ion PUIL por simpligi, almenaŭ, la mozaikon se ne eblas momente la absoluta kunigo? Cerbumu ĉiuj K.-doj!

Ne malfacile estas kunigi la diversajn sektorojn. Nur mankas trovi la rimedon. La kongreso povas multe fari por la simpligo. La ĉefa afero estas ĝisfunda volo kaj lojalo je la servo de proletaro per Esp.o. Ja ĉiu el la ses cititaj sektoroj

ne priokupiĝas pri si nek pri la aliaj; almenaŭ ne sufiĉe. Ĉiu agas kvazaŭ la aliaj ne ekzistus.

Anstataŭ konverĝi, la sektoroj diverĝis.

Anstataŭ malproksimiĝi, nia klasa devo estas la energiega alproksimiĝo.

Se la diversaj sektoroj daŭre adas en tia memmortiga morala kaj organika distanco, neniam ni renkontiĝos. Estas necese, ke unuj iru la aliajn, ne timante perdi la indecon pro tiu ĉi ago. Kiu komencos?, kiu estos la unua?

La 5 sektoroj ne iras al tiu de PUIL, nek PUIL iras al la ceteraj sektoroj; ja ĉiu sektoro tiras por si.

Kaj tio estas absurdaĵo, do, la kresko de unuj ĉiam nepre favoras la aliajn. Nia idealo estas esti utilaj al laborista klaso; kaj ofte ni tro forgesas tion. Ni volas prosperigi Esperanton; sed troofte ankaŭ ni ne disvastigas Esperanton sufiĉe larĝe pro nia disa kaj malriĉa laboro, pro nia kata kapablo.

—3—

PUIL estas la unua tut-hispania proleta esperantista organizaĵo. PUIL estas la sola organizaĵo por la tuta lando. PUIL estas la sola sektoro, kiu *enlande* estas organizita. Kiu, do, *enlande*, estas pli devigata ol PUIL atenti la unuecemon, kiun ĉiuj esperantistaj laboristoj portas en sia koro?

Ja la organizintoj de PUIL scias, ke *la baza principo de esperantismo laborista estas ĝia internacieco.* Sed ili bazis sin sur du principoj, kiujn ĉi tie ni ekspozas, por fine fari la decidon aliĝi al la Internacio. La fondintoj de la Federacia Unuiĝo esperis ligi PUIL al la Internacio, kiam ĉiuj nunaj esperantistaj internacioj (almenaŭ la plimulto da ili) fandiĝus en unu solan; aŭ ili esperis ricevi la entuziasman aliĝon de ĉiuj proletaj grupoj de Esp.o kaj izoluloj el la tuta lando al PUIL, kaj en okazo de Kongreso decidi la aliĝon de PUIL al preferata Internacio.

Ĝis nun efektiviĝis nek unu nek la alia principo ankoraŭ. Ĉu PUIL devas *pasive* atendi unu aŭ alian efektivigon? Ĉu PUIL *aktive* volas kaj povas partopreni en ambaŭ principoj, kiuj ŝajnas evolui paralele? Ĉu PUIL restu, kiel ĝis nun aŭ ĝi modifu sian nunan pozicion? Ĉu per la modifo PUIL kaj la proleta esperantismo hispania ricevos gravan antaŭenpaŝon aŭ ĉu kontraŭe, ili malgajnos? Gekdoj, okupiĝu pri la temo, ĉar ĝi vere meritas nian atentan studon!

A. TORALLOLA.

— Kamarado. PUIL kaj Proleta Voĉo ne forgesas vin. Vi ankaŭ ne forgesu ilin. PUIL kaj Proleta Voĉo bezonas vian penadon, moralan kaj materialan.

— Ĉiu varbu novan abonanton por Proleta Voĉo.

PORKONGRESAJ MEDITOJ DE PUIL-MEMBRO

Kiel ĝramatike fari sukcesajn Kursojn de Esperanto

Necesus ke la kongreso okupu sin pri la instruo de Esp.o al laboristoj, ne por proponi rigidan kaj devigan instruprocedon, sed por aktualigi la temon kaj pripensigi al ĉiuj PUIL-anoj pri la plej konvenaj rimedoj ne de propagando, sed de efika laboro *dum* la kursoj. Ja la kongresanoj kaj la cetera kamaradaro devas atenti la lokon, la lernantojn (aĝeco, nombro, kvalitoj...) la kondiĉojn de instruantoj (ilia kulturo K. aliaj karakteroj); ankaŭ la kamaradoj priatentos la materialojn je kiuj ili disponas por kursi, ne forgesante, finfine, la epokon de la jaro kaj la tempon, dum kiu la kurso devas daŭri.

Ĉiu instruanto devus adaptiĝi al la kondiĉoj de lernantoj por adaptigi pli sukcese ilin al la celoj de kursgvidanto kaj sekve, de PUIL.

Kiom eblos, la instruanto ĉiam devus fari la Klarigojn por ke povu ilin konepreni la plej mallerta lernanto de la klaso (se ĉi tiu meritas tion, se la neprogresinta kamarado estas akurata kaj ĉiam enestas li en la klaso, se li montras sin obstina en la lernado).

Tamen, ni ne forgesos ankaŭ la plej lertajn kurspartoprenantojn kaj ni dediĉos al ili la tutan eblan atenton, ne perdante la harmonion de la klaso dum la lecionoj kaj dum la tuta kurso. Ofte, por profiti la avantaĝulojn, mi devis *iel* (ne entute) forlasi lernantojn tiel malkapablajn (kaŭze de malkulturo, troaj okupoj aŭ de speciala cerba konstituo), ke ne sufiĉis al ili unu elementala kurso de Esp. o; ili almenaŭ bezonis ĉeesti en du sinsekvaj kursoj elementalaj de Esp. por lerni kion oni ekspozas dum unu sola kurso.

Ni petas vin respondi al vi la jenaj demandojn:

1. Ĉu vi estas kontenta pri formo k. eksteraĵo de Proleta Voĉo?

2. Kion el la enhavo vi legis kunplej granda intereso?

3. Kion vi konsideras superflua, neleginda?

4. Kiajn ĝeneralajn konsilojn vi donas al vi.

LA REDAKCIO.

— Memoru pri renovigo de via abono por Proleta Voĉo.

Tiel oni provas eltiri la tutan profiton de avantaĝuloj en malmulta tempo kaj ankaŭ la tutan eblan profiton de lernantoj, kiuj bezonas pli da tempo por lerni, kion la unuaj akiras senpene kaj rapide. Ni speciale atentos, ke malprogresantaj forgesu kion ili lernis kaj samtempe ni progresigos ilin laŭeble ĉiam. Je la fino de la kurso ni konsilos kaj donos la rimedojn al ĉiuj, ke ili ne perdu la kontakton kun Esp.o kaj kun la esperantistaj organizoj. Al nesukcesintaj lernantoj, ni diros plie, ke ili partoprenu alian kurson de Esp.o por sia plua kapabliĝo.

Tio signifas, ke de preskaŭ la unua tago de la kurso ĝis la lasta oni devas *ripetadi* la klarigojn el pleja diversmaniero, laŭkaze.

La bazo de la kursa laboro devas esti la ĉiutaga ripeto de gramatikaj konceptoj (aldonante iom post iom novajn) kaj la vortosignifoj (de la simplaj ĝis la plej malsimplaj vortoj, instruante tiel la vortfaradon, ĉar ĉi tiu en esperantio estas pli valora por lernantoj ol frazfarado); sed kiam ne temas pri novaj konceptoj estas preferinde, ke la instruanto helpu al la lernantoj mem trovi la vortosignifon (ĉefe se tiu ĉi estas malsimpla) kaj eldiri ili samtempe la gramatikan vortovaloron.

Alia kondiĉo por la sukceso: la lernantoj ne perdu nek unu klason kaj estu akurataj. La instruanto, aŭ la lernantoj mem sub formo de *kursa komitato*, zorgos atentege la malfruojn kaj instigos, ke lernantoj neniam manku en la klaso.

Kontinueco estas la plej urĝa kondiĉo por la sukceso de la kurso; sed ne kredu ke *kontinuado* rilatas nur al tempo, ĝi rilatas ankaŭ la laboron de lernantoj kaj de gvidantoj. Neniam forgesu mil k mil foje ripetadon kaj ripetigadon de klarigoj, signifoj k. t. p. por asimiligi la lingvaĵon kaj ties bazon sciencan ĝis la momento, kiam flue, kvazaŭ rutine, senpene la lernantoj post tioma praktiko kaj ripeto vidas klarege, kvazaŭ dum la tuta vivo ili estus aŭdintaj kaj farintaj la samon. El tio oni deduktas, ke neniel ni komencos kurson, se ĝi nur povas esti dutaga posemajne; kaj se la kurso devas daŭri malpli ol tri monatoj ankaŭ estas konsilinde ne akcepti fari ĝin.

Kontinuado en tempo
Kontinuado en laboro
t. e., *ripeta metodo*
(el método "machaca" del castellano.

Ni konscias de multaj jaroj, ke laboristaj instruantoj kaj laboristaj lernantoj, ambaŭ ne alkutimigitaj al la sciencaj aferoj, nur ili povas sukcesi ĝenerale danke al la senĉesa, neinter-rompigita laboro kaj kontakto kun Esp.o. Ja nenion oni ĝuas sen antaŭaj penoj por gajni tiun ĝuon. Per *kontinuado* oni enkarnigas ĝisoste la fundamentajn konojn de Esp. o kaj de ĝia gramatiko, esenca kondiĉo ĉi tiu por esti lerta esperantisto.

Tamen la klarigoj ĉiam estos konkretaj; nur povos esti donata iun difinon, kiam ĉiuj lernantoj el koncreto ili estas jam kapablaj ĝeneraligi kaj abstraktiĝi.

En alia artikolo ni plue malvolvos la problemon.

INSTRUISTO.

POR INFANA LITERATURO

ĜUSTE ĈE LA BLUA MARO

verkita de LEO KASSIL, esperantigis ROMANO FRENKEL.

La doktoro mortadis. La ŝveltubero sufokadis la vivon, ĉifdifektis la vidsenton. Sed la doktoro ne kapitulacis. La malbenita ŝveltubero, premanta la konscion, ne povis premsufoki la revon. La doktoro revis...

Li estis severa kuracisto, senindulge postulema en la laboro, armea kuracisto, altkreska, grizhara . . . Kruelkora homo — nomos lin laborfuŝantoj; "Ĉefsanatoriaadministrejo" — oni nomis lin en la lando; amiko de la sovetgepioniroj—, nomis lin infanoj; homo el Arteko—alnomis lin Henriko Barbusse; Zinovij Petroviĉ Solovjov — raportis lia partibileto; kuracisto — komunisto, fervola administranto, homo de eksterordinara boneco, laŭ atesto de bone konanta lin Klara Zetkin, senlaca batalanto de la Ruĝa Stelo kaj de la Ruĝa Kruco — li estis kapabla revi pasie, entuziasme, kiel kapablas revi la plej bonaj homoj de Lenin'a skolo.

Li sciis revi infanece, gaje, junigante mem en la revo sia kaj ĝoje kredante je la efektiviĝo de la plej arogaj fantaziaĵoj. Li konis kaj komprenis la infanojn, li scipovis partopreni en iliaj interesaĵoj malĝojoj kaj esperoj. Sed pri kio povas revi dek-dujara civitano de USSR?

Esti forta kaj kuraĝa tiel, ke neniu povu lin venki. Kaj por ke estu maro, granda, blua-bluega, kaj ke estu sur ĝi ŝipoj kaj flagoj, kaj ke oni povu sin bani kaj kolektadi ŝtonetojn, kaj ke oni havu sian propran lacerton, kaj ke kantu matene la trumpeto, vekante kaj proklamante heltagon sen unu nubeto, tiel sun riĉan-eĉ duan fermetu la okulojn kaj ke estu palmoj kaj floroj kaj montoj altaj-altegaj, ĝuste malantaŭ la dorso, kaj ĝis la ĉielo mem, kaj ke oni povu puŝbati kelk-

foje la pilkon enŝraubigi ĝin kandel maniere en la aeron, kaj ke oni fariĝu ruĝahaŭtulo, kaj ke estu glaciaĵo kaj diversaj bongustaĵoj, kaj bona ke oni mem konstruu, kaj ke venu gaste la ruĝarmeanoj, kaj ke oni rakontu fabelojn ĉe la lignofajro, kaj ke poste oni revenu hejmen kaj fanfaronrakontu al ĉiujn venku en la lukto per la maldekstra brako.

La doktoro bone sciis kaj komprenis similajn revojn. Li mem revis trovi taŭgan lokon en sovetia lando, taŭgan anguleton, kie la plej flamiĝema infana fantazio povu ekapud efektiva maro, sur niaj bordoj. vivi, instalita sub efektiva suno,

Kaj vagpromenante laŭ la bordo de Krimeo, nemalproksime d e Suuk-Su, apud Aju-Dag, li trovis sovaĝan anguleton, neloĝatan, dense kovritan per arbaro, kaj kvazaŭ ensorĉitan. Kaj la doktoro decidis, ke li trovis la ĝustan adreson de sia revo.

Tie, sur tiu loko, estis fondita genionirtendaro — Arteko, laŭ la ideo de la doktoro kapabla "malkovri antaŭ la infano la tutan senson, la tutan belecon, la tutan kreemecon de la nuntempa vivo". Tie, ĉe la malsupro de Aju-Dag-monto, kie iam, kiel oni rakontas, sin estis kaŝinta kaj finvivadis sian tumoltoplenan vivon la legendeca grafino De Lamotte, la heroino de unu el romanoj de Dumas, kie restis duone ruiniĝinta dometo alnomita "diabla", — elkreskis tendaro, en kiu iom post iom aperis ĉio, pri kio oni povas revi en la aĝo inter dek kaj dekkvi.. jaroj.

Tio estis en la jaro mil naŭcent -dudek-kvina. En la pionirtendaro de tiu epoko reĝis banala "indianaĵo". Antaŭ nelonge mi aŭdis ĉe unu el pioniraj lignofajroj rememorojn de unu el la lastaj mohikanoj de "indiana" periodo de la sovetia gepionirmovado.

(Daŭrigos)

— Ciu vi jam renovigis vian abonon por Proleta Voĉo?

Oficiala vivo

Nune okazas esperantaj kursoj sub P. U. I. L. - signo ĉe la urboj: Barcelono (diversloke: Akademio Laborista Esperanto; Ateneo Popular de Gracia; Ateneo Enciclopédico Popular, k. t. p., k. t. p.), San Cugat, Sabadell, Tarrasa, Paboleda, Lérida, Rubí, Moyá, Monistrol de Calders, k. t. p.

* * *

Specialan mencion ni ŝuldas al la Akademio Laborista Esperanto (la centra sidejo de P U I L), kiu fiere povas atesti sen ebla fakta kontraŭdiro, ke ĝi estas la plej grava esperantista societo de Hispanio (ĉu neŭtrala, ĉu laborista).

La tuta dometo estas je la dispono de la Akademio. En ĝi la Kdoj konstruis gravan modernan gimnastikejon, apude al kiu estas porindividua sistemo duŝeja, unu sistemo por virinoj kaj alia en la unua etaĝo por la Kdoj viraj. Ankaŭ la Kdoj konstruis teatron, dividis la dometon je diversaj klasejoj, biblioteko, sekretariejo k. t. p. Ni ne troigas se ni jesas, ke se oni devus taksi la laboron de la Kdoj kaj la materialojn uzitajn la elspezoj altiĝus je 15,000 ptoj, eble 20.000. Eĉ venis por fari murojn k. t. p. kelkaj Kdoj masonistoj el San Cugat por helpi la masonistajn. Kdojn akademianajn. La kamaradoj ĉarpentistoj ankaŭ imitis dc kun helpis. Kdo inĝeniero gvidis la konstruojn kaj Kdoj kuracistoj la gimnastikan aparataron kaj gimnastikulojn... La pentristoj ankaŭ faris sian oportunan laboron. Aliaj Kdoj gvidas plej diversajn kursojn inter aliaj kantado kaj piano, matematikoj, filozofio proleta ekonomio, k, desegno, kursoj alementalaj kaj superaj de Espe.o, kursoj por analfabetoj; kina gvidado d e teknikaj aparatoj, fotado, k. t. p., k. t. p.

Dum longaj monatoj la Kdoj senĉese laboris dum ĉiuj festoj (dimanĉojn, k. t. p.), matene aŭ vespere kaj eĉ nokte (post la panakira laboro tuttaga).

Nur restas al ni gratuli la Kdojn pri la giganta laboro, kaj ne taksablaj penoj eluzitaj dum pli ol unu jaro. Antaŭen por la kreo de potenca proleta esperantismo, intime kunaganta Nacie kaj internacie!

—

Niaj kamaradoj el Esperanta Grupo Universala Frateco, komence de pasinta Desembro, publikigas sian monatan bultenon ni deziras al "Naŭa Kvartalo" la plej grandan sukceson kaj samtempe ni gratulas niajn kamaradojn pro sia kuraĝa antrepreno.

INFORMEJO DE P.U.I.L.
Strato Hospital, 54, pral. - BARCELONO

KORESPONDADO

JAPANIO

La 7.ª Rondo volas kor. kun chiu lando. Amase - individue, kaj intershanghi materialon. La 7.ª Rondo ce k-do. S. Reu. Eviaku-cho. TAIHOKU FORMOSO.

Kazuuo Hugita-Nishitenmei-Coo Rjuusakuba-NIIGATA- 30-jara oficisto dez. kores. pri internaciaj, politikaj, sociaj aferoj kaj legi esperantajn gazetojn prefere sociaj.

SOVETIO

La esperantista gestudenta chelo de la Teknologia Tabakteknikumo en Jalta (URSS-Krimeo) dez. kor. kun eksterlandanoj pri socialisma konstruado k movado, k aliaj temoj.

RADAKCIO

Ni petas al la kamaradoj kiuj kunlaboras en "Proleta Voĉo" ke kiam ili verku artikolon, klopodu ke ĝi estu mallonga, efika kaj legebla, lasante inter la linioj, la sufiĉan spacon por faciligi la laboron de la kompostisto.

G. A. S. Aribau 128